



BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

AÑO XXI - Nº 259

SEPTIEMBRE-OCTUBRE 1983



S-ro So Gilsu el Koreujo kaj s-ro Salvador Aragay, ĉefredaktoro de «BOLETIN» interkonsentas pri Internacia Kunlaboro.

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Directora: María Aurora Viloria

DIRECCION Y ADMINISTRACION

Apartado 119 - VALLADOLID

REDACTOR JEFE

Salvador Aragay Galbany

Bassegoda, 40

Tfno: (93) 3338081

BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION

Giordano Moya

Vicente Hernández Llusera

Gabriel Mora i Arana

Pedro Nuez

Luis Serrano Pérez

Miguel Gutiérrez Adúriz

ENHAVO

La Esperanta Kongreso en Zaragozo	3
La rajto je komunikado	10
Raporto pri la agado de H. E. F.	12
La armigado	14
35-a I.F.E.F. Kongreso en Ostendo	16
La plej multnombra U. K. okazis en Budapêsto	17
Recenzoj, Recenzoj	22
Deziras korespondi	23
44-a Hispana Kongreso de Esperanto	24

UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Apartado 119
VALLADOLID

Prezidantino

María Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12, 2º C
Tfno. (983) 260086
VALLADOLID-11

Sekretario

Luis Hernández García
Adreso kiel supre

Kasistino

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde, 8, 8º A
VALLADOLID-14

Pagojn sendu al nia Konto
Nº 001.664-0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana 6
Avda. Vicente Mortes
VALLADOLID

Libroservanto de H. E. F.

José González Suárez
Apartado 119
VALLADOLID

Pagoj por libro-servo sendu al unu el la
jenaj kontoj:

Cuenta Postal 3.118.078

Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cta. Nº 042.268-4 a nombre de
LIBRO-SERVO DE LA FEDERACION
ESPAÑOLA DE ESPERANTO
VALLADOLID

ELDONA FAKO

Inés Gastón
Pº de la Constitución, 35, 4º
ZARAGOZA-1

ĈEFDELEGITO DE U. E. A.

Juan Azcuénaga Vierna
Gral. Dávila, 127, portal 7, 2º lz.
Tfno: (942) 339487
C. Postal: 03548531
SANTANDER

H. E. J. S.

Atocha, 98, 4º
Tfno: (91) 2308798
MADRID-12



Prezida tablo dum la solena inaŭguro de la Kongreso.

LA ESPERANTA KONGRESO EN ZARAGOZO

Ĉijare la hispanaj esperantistoj kuniĝis en Zaragozo por eksterordinara Kongreso, ĉar krom la okazigo de la 43-a Hispana Kongreso oni festis la jubilean 75-an datrevenon de «Fratego».


Sub la kadro de la moderna kaj impona konstruaĵo «Centro de Exposiciones y Congresos de CAZAR» la

21-an de julio okazis la Interkona Vespero. Preskaŭ kvarcent esperantistoj ĝoje svarmis en la kongresejo, ĉar la plej multo nur unufoje en la jaro reciproke renkontiĝas por kongreso. Multe surprizis la filatelistojn kaj eĉ nefakulojn la Filatela Aragona Ekspozicio pri Esperanto, jam inaŭgurita la 18-an de julio.

La 21-an de julio, ĵaŭdon matene okazis la kunsido de la HEF-estraro kun delegitoj de Grupoj; laŭkutime oni traktis internajn aferojn. Post la Malfermo de la Kongreso okazis la oficiala fotado antaŭ la portalo de la Fakultato de Medicino kaj vespere okazis la ekzamenoj pri esperantoscio kaj la hispana prelego. La preleganto, s-ro. Adolfo Castillo Genzor komencis sian paroladon dirante ke li ne faros lecionon nek mitingon ĉar li estas inter amikoj por dialogi. Post la mencio de siaj rilatoj kun Rafael Gastón kaj Sancho Izquierdo, li asertis ke Esperanto naskiĝis antaŭ ol ĝin kreis Zamenhof. Okcent jarojn antaŭe en monahejo, Gonzalo de Berceo inventis «esperanton». El la disigita kaosa latino, li faris la hispanan lingvon. Kiel anekdoton Castillo rakontis ke kiam nia reĝo Karolo la Unua kaj Kvina de Germanujo

komencis sian regadon, li ne sciis la hispanan lingvon. Li esprimis sin per la flandra lingvo kaj dum li ne sciis la hispanan, li ne sukcesis en la regado.

Rilate la malkovron de Ameriko, li komentariis ke Kristoforo Kolumbo manifestiĝis nekapabla regi. La festotago 12-a de oktobro ne devas esti la tago de la raso, sed de la lingvo. En Ameriko estas multaj rasoj, la hispanoj fondis universitatojn, konkeris konsciencojn. La hispanoj iris al Ameriko por servi. La instrumento ne estis la kulturo, unue estis la justo kaj poste la lingvo. Oni diras ke «nur unu lingvo kaj unu sola kredo». Dum la Centjara milito la du intermilitantaj reĝoj parolis la saman lingvon, ĉar la havaĵoj estis tio plej grava. Kontraŭe Esperanto nur per la amo sukcesos. Esperanto estas la kuniĝo de amo kaj frateco.



Prof. Adolfo Castillo
prelegante.

Esperanto venis ĉijare al Zaragoza, la urbo de la grandaj sintezoj. La rivero Ebro naskiĝas en Kastilio kaj finiĝas en Katalunio. Laŭ diro de Sankta Johano la verbo estis Dio. La verbo faris ĉion. Sed nun ni troviĝas en kompleta Babelo, 2.500 lingvoj kaj aliaj dialektoj. Nur en Aŭstralio 500 triboj parolas 500 lingvojn. Paroli estas kompreni kaj kompreni estas ami. Kiel diris Zamenhof en Boulogne Sur Mer la Interna Ideo de Esperanto estas tre grava.

Kiel finon de sia disertacio li rakontis fablon pri la najtingalo kaj la frugilelo. La najtingalo parolas bone, sed la frugilego malbele blekas. Ni parolu en Esperanto kiel najtingaloj, ne kiel frugilegoj kiuj plej abundas.

VENDREDON, 22-an de julio

Frumatene okazis Fakaj Kunvenoj, inter ili tiuj de Hispana E-Asocio «Antón Balagué» (Hispana sekcio de M.E.M.): H.E.J.S. (Junulara Sekcio de H.E.F.): I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) Hispana Sekcio; Hispana Esperanto Fervojsista Sekcio... kaj sekvis la **Simpozio pri Komunikado**.

Unue prelegis Peter Schilperoord, organizanto de la Grupo Kvin Pintoj el Londono, kiu traktis en rilato al la komunikado, pri arto kaj Teknologio. Li diris, ke la komunikado mem ne estas io nova! Male ĝi estas samaĝa kiel la vivo sur nia planedo. Homoj —kaj bestoj— ĝin daŭre aplikas, plej diversmaniere. Sen ĝi, socia vivo ne estas imagebla. Prahistorie la komunikado konsistis el gestoj, vizaĝesprimoj, sonoj (ĉu gruntoj, krioj aŭ voĉoj), signaloj —fum aŭ lum-signaloj— helpe de instrumentoj, kiel tamtamo, fajfilo, k.t.p. Precipe en la lasta jarcento la Arto kaj la Teknologio kreis tre potencajn rimedojn. Telegrafo, telefono, filmo, radio, televido, videobendo, satelitoj, komputilo kaj multaj aliaj. Nun la

plej pratempaj esprimiloj —la gestoj— ankoraŭ ludas gravan rolon. Sed la ĉefa esprimo, por ni esperantistoj, estas lingvo. Aŭ des pli bone: lingvoj. Ni bezonas niajn respektivajn naciajn lingvojn por antaŭenigi nian komunan internacian lingvon Esperanto. Tamen, li diris, atentu! Antaŭ duonjarcento iom ĉifonaspekta flugfolio taŭgis por nia celo, sed nun ne.

Same eksmodaj estas la afiŝetoj gluitaj sur butikfenestroj. Ili perdiĝas inter tiuj, kiuj instigas al aĉetado de eluzitaj aŭtomobiloj aŭ lavomashinoj. Kiujn rimedojn ni, do, apliku? Se eble... la samajn, kiujn aplikas la grandaj firmoj kaj produktistoj; la plej modernajn je nia dispono! tio ĝuste estas la celo de Grupo Kvin: informi kaj instrui per plej modernaj rimedoj.

Ankoraŭ nun troviĝas homoj en Britio, kiuj eĉ ne scias... kio estas Esperanto! Sed kontraŭe, la tuta mondo scias, kio estas... Koka-kola! Kial Esperanto ne estas sampopulara? Nu, kelkaj inter ni opinias: pro tio, ĉar ni pli malpli donacas Esperanton al iu ajn, kiu bonvolas akcepti ĝin. Do, ni, ne povas fari profiton, Pro tio, ni ne havas, kaj eble neniam havos, la necesan kapitalon por grandskale kaj efike reklami nian lingvon. Tamen, tiu manko de monrimedoj ne signifas, ke ni neniam povas atingi sukceson. Estas je nia dispono aliaj rimedoj: nia idealo nia konvinko kaj plej diversaj kapabloj, kun la ingrediencoj entuziasmo kaj dediĉo. Vivanta ekzemplo pri tio estas Grupo Kvin. Ni varbis simpatiantojn, moralajn kaj financajn subtenantojn kaj fakajn konsilantojn.

Peter Schilperoord rakontis pri la travivaĵoj, kiuj atingis la sukceson elsendi kurson de Esperanto en universitataj radiostacioj; pri la kasetbendoj kaj kaset-kurso kun vortaro kaj legomaterialo. Per celtrafa reklamado, nia komunikado fariĝis sukcesa.

De multaj landoj alvenis petoj por traduki nian kurson. Jam aperis en traduko itala, islanda, dana kaj sveda. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne ricevis novaĵojn, ĉu iu intencas traduki ĝin en la hispanan!

Li konkludis: Ni vojaĝis de la pratempo al la epoko de la komputiloj (ni iom haltis en la periodo de la multobligiloj). Ni ankaŭ venis de la simpla uzado de la telefono al uzo de la telefono por pri-informi kaj instrui Esperanton. Malgraŭ tio, ke nia Movado estas iom malnovmoda, uzante malnovajn rimedojn, ni nun havas seriozan eblecon ŝanĝi tion kaj transsalti subite —tre subite— en la 21-an jarcenton de nia Mondo!

Post kelkaj pluaj intervenoj partoprenis en la Simpozio pri komunikado Luis Hernández García. Li en sia parolado rimarkigis la eventon de la Deklaracio de la Homaj Rajtoj Kaj la Komunikado en rilato al tiuj rajtoj. Menciinte la Deklaración de la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano fare de la Franca Revolucio, kaj la moderna deklaro de la Ruĝa Kruco, li diris ke tiuj rajtoj jam estis formulitaj kiel naturaj rajtoj en la 15-a jarcento fare de Francisco de Vitoria kaj ke agi kontraŭ la amikeco estas agi kontraŭ la naturaj rajtoj.

Kiel defendi la Homajn Rajtojn? Kiamaniere tion solvi? Ni havas la solvon, kvankam oni ne aŭskultas nin. Zamenhof trovis la plej efikan solvon en la internacia komunikado. Neŭtrala internacia komunikilo estas efektigilo de la Homaj Rajtoj, ĝi estas Esperanto. La klopodo por Esperanto estas klopodo por la Homaj Rajtoj.

Oficiala Akcepto fare de la Urbaj Aŭtoritatoj

Tagmeze okazis la Oficiala Akcepto fare de la Urbaj Aŭtoritatoj. Nin akceptis la Delegito de Kulturo per convenientaj vortoj: «Fronte al egois-

mo kaj perforto, la esperantismo prezentiĝas kiel kihota celado. La demokrata konsilantaro helpas kun speciala intereso Esperanton —instrumento de komunikado— kiun la publikaj institucioj devas pli apogi. La komprenado estas firma malvolviĝo de la kulturo. La zaragozanoj devas lerni esperanton, ĉar Esperanto estas kulturo».

Nia Prezidantino dankis pro la komprenado de nia mesaĝo. «Ni bezonas la apogon de la demokratiaj institucioj. Dankon».

Lunĉo sekvis la akceptan parolon. En la kongresejo ni aŭskultis la gravegan paroladon de Juan Régulo Pérez, nia universitata profesoro de La Laguna. Li skize diris: «La gravo de la socia komunikado estas fakto. La fundamento de la socio ne estas la socia kontrakto, ĝi estas la vorto, ĝi komenciĝis kiam la homoj konversaciis, eĉ per gestoj.

Niaj politikoj kaj religioj apogas sin sur sonoj, estas sencoj. Tamen diri ke la socio estas komunikado estas taŭtologio. Diri ke la socio estas komunikado ne estas multe, la realaĵo estas la konscio, ĉar la tuto, de post la komenciĝo de la historio povas reduktiĝi al MI ESTAS kun la variantoj NI ESTAS LA POPOLO ELEKTITA, NI ESTAS LA KLASO ELEKTITA. La verbo estas singulara aŭ plurala. Ĉio socia estas plurala, ĝi estas malplena verbo, kiu sin realigas per predikativo. La sistemoj transformiĝas en sistemojn de sistemoj, ĉiam la lingvo estas la sama: ĉu hispana, ĉu japana. De la lingvo oni iras al la komunikiloj. Illi ne estas lingvoj, ili estas la rezulto de konvencio, ili estas kanaloj kaj neŭtralaj. La televido respondas al la nuna socio. Multaj komunikiloj tempe transiris: Ni uzas fenican alfabeton.

En kiu ajn religio aŭ reĝimo la homoj legas ĵurnalojn, vidas filmojn. Le bildoj universaligiĝas. Ni aperas sur la televido kaj ankaŭ la Papo.

Estas interrilatoj inter la komunilkiloj.

Ne ekzistas socio sen poemoj. La ligo inter poezio, muziko kaj danco estas tre antikva. Ili disiĝis en prozo kaj kanto je unu ekstremo, je alia ekstremo, la tipografio. Aperis la libro.

Oni aŭskultas publike, sed legas individue. La poezio estas ritma parolo. Ĉiu poemo enkorpiĝas en sonojn kaj ritmojn.

Tio estas la lingva aspekto de la komunikado kun la nuntempaj radio kaj televido. La alia areo de la komunikado estas la presarto. Danke al tiu komunikilo estis konceptita Esperanto.

La presarto ne povis esti inventita, ĝi fariĝis bezo. Kia estis la sciado ĝis la preso? Ĝi estis konfidenca, io esotera. La scio estis privilegio de elektitoj. La romkatolika eklezio adoptis tiun sistemon. Sciado nur por malmutaj elektitoj.

La presado povas informi ĉiujn per la libroj. Bremsi la presadon, la Papoj ne povis. Ili trovis necesa kontroli la presarton.

Disvastiĝis la tipografio. La Turkoj konkeris Bizancon kaj alvenis manuskriptoj. Oni malkovris novajn landojn. La vivo fariĝis grandioza. Kio estas la vera filo de la presarto?: La Reformo, Koperniko, Bakono, Kalvino, Rousseau, Rabelezo, Don-Kihoto. Dank'al la presarto Lutero kontraŭvenkis, kaj estis Galileo.

Kion signifas tio? Ĉiu jarcento havis sian gloran inventon. La sangano cirkuladon, ekzemple. Sed ekzistas aliaj gloraj ekzemploj de homa stulteco. Pariza universitato ne agnoskis la mikrobojn. Ni ankaŭ ne agnoskis la kapablon de Severo Ochoa. Esperanto ankaŭ havas speranton pri la eminenta stulteco.

Per la tipografio eliris la Enciklopedio de la franca liberpensado kaj due la genia verko de Zamenhof, la unua libro pri lingvo internacia. Ĝia intelekta forto estas tiel forta, ke danke al ĝi ni kunvenas ĉi tie.

La presarto estas en si mem poezio, tiu apogilo per kiu leviĝas la homo! Dank'al la presarto ni povis unuafoje scii, ke la homoj loĝas sur simpla sapveziko. Verko estas la frukto, estas la libro. Verko en Esperanto estas libro.

Post la esperanta disertacio venis la

Omaĝo al la Veteranoj Víctor Ortiz prezidanto de «Frateco» diris kelkajn vortojn por honori la memoron de la fondintoj de «Frateco». Ili prenis la torĉon laborante, ĉu en favoraj cirkonstancoj, ĉu en nefavoraj. Ortiz diris, ni daŭrigu antaŭen —rekte, kuraĝe kaj neflankiĝante—.

D-ro Sancho Izquierdo, nome de la veteranoj, dankis al ĉiuj kaj direktis siajn vortojn al la junularo: junuloj sekvu nin!

Salutis en omaĝo al la veteranoj unue la eksterlandanoj kaj sekve la reprezentantoj de landaj sekcioj kaj esperantistaj grupoj.

La Prezidantino de H. E. F. reliefigis la gravan rolon de «Frateco». Du el tiuj fondintoj konis persone D-ron Zamenhof en Barcelona en 1909-a kaj menciis la solidarecon de «Frateco» kun la aŭstraj orfoj de la Unua Mondmilito.

Por paŭzo, la artistino s-ino Encarnación Ferré akompanata de sia filino per gitaro, deklamis belajn poemojn kaj kantis kanzonojn en Esperanto kun vera altnivela arto. Poste kaj ceremonie estis disdonitaj diplomoj al la veteranoj, unuavice al la vidvinoj. Je la fino s-ro Hernández Yzal kun gratulaj vortoj donis la medalon «Premio Klara Silbernik» al s-ino Alicia Aznar Lahoz edzino de d-ro Fernando de la Puente.

SABATON, 23-an de julio

Matene okazis la kolektiva vizito al la arthistoriaj monumentoj de Zaragozo kaj vespere la Ĝenerala Kunveno de H. E. F.

La Ĝenerala Kunveno komenciĝis per raporto de la Estraro pri aktivaĵoj kaj ĝin sekvis diskutado pri modifo de kotizoj, informo pri «Boletin», normoj kaj reguloj pri organizo de Kongresoj, modifoj en la ekzameno de esperanto-scio, kaj proponoj pri kongresurboj. La venonta jaro la Kongreso okazos en Sevilla kaj por 1985-a estis elektita Cartagena; por 1986-a du proponoj: Santiago de Compostela kaj Alcoy; kaj por 1987-a la Jubilea Jaro, oni proponis Madridon.

Nokte en la Teatro de la Specimena Foiro ludis, kantis kaj dancis el aragona folkloro la altkvalita baloto «Aragona Bastiono».

DIMANĈON, 23-an de julio

Dimanĉon matene en la Preĝejo «San José Pignatelli», la paroĥestro «Del Pilar» Juan Gasca, celebris la Sanktan Meson. En sia prediko li atestis pri la nuna stato de nia epoko: Troa laboro, bruado, dezirego, pri materialaĵoj, laceco de spirito, mankoj de konvinko kaj fido. Tamen, lukto por defendi la Homajn Rajtojn.

La ateistoj ankaŭ laboras por la aliaj. La ateistoj ne preĝas, la aliaj religioj preĝas malsimile.

La preĝado ne estas nur peti. Dio estas super la homo. Se ni klopodas por serĉi Lin oni Lin trovas.

Ĉu la moderna homo scias preĝi? Sankta Tereza diris: Ne multe pensu, se multe amu. Se mi praktikas karitaton mi ne bezonas preĝi. Sed, la preĝado estas fonto de energio. Preĝe ni povas peti ĉion. Ni petas por la spirita kaj materia sukceso de Esperanto.

EN LA VESPERO:

Simpozio pri la Centjara datreveno de Esperanto.

Malfermis la simpozion Salvador Arago kaj menciis la aperintan bro-

ŝuron de UEA «Kiu faras Kion», en kiu la aŭtoroj, Anna Brennan kaj Renato Corsetti, prezentas la planojn ellaboritajn de UEA pri la Centjara Jubileo de Esperanto, kaj resumis ĝian enhavon.

Li faris demandojn: Kiel omaĝi Esperanton? Kiel fortikigi la progreson de Esperanto en nia urbo kaj la tuta lando? Eble estos interese ŝanĝi nian koncepton pri organizado kaj de nun studi serioze: kiajn aranĝojn organizi? Kiel nia tuta lando povas kunlabori kun UEA? Kiel nia gazetararo faru favoran kampanjon por la centjara jubileo?

«Estimataj samideanoj: Ni havas gravegan defion pri la unika evento de nia esperanta vivo. En nia lando ekzistas 30 esperantistaj asocioj kaj 4 esperantaj sekcioj. Nia unua agado devas esti kunigi la individuajn kaj grupajn agadojn kaj por tio estas necese starigi Hispanan Jubilean Komisionon».

La parolo de s-ro Aragay malfermis viglan diskutadon. Estis proponita Patrona Komitato; alia propono, ke infanoj ĉeestu kongresojn, helpe de onkloj-esperantistoj; okazigi en 1987-a imponan Kongreson en Madrido kaj alia propono por Barcelona en memoro de la ĉeesto de d-ro Zamenhof ĉe la tiea Universala Kongreso en 1909-a. Fine, estis nomumita Hispana Jubilea Komisiono por tuj agi, gvidata de s-ro S. Aragay.

Fermo de la Kongreso.—Malfermis la kunsidon nia Prezidantino. Dankis la Sekretario al ĉiuj agantoj kaj partoprenantoj kaj paroladis s-ro Antonio Marco, Sekretario de L. K. K., kiu komencis per —Ĉio finiĝas— sed antaŭ ol la —ĝis revido— li faris skizan historion de «Frateco». Dum la ekzisto de «Frateco» la societo vidis du mondmilitojn kaj spertis nian propran kaj dum tiuj travivaĵoj ne mankis kuraĝuloj por repreni la torĉon», S-ro Marco Botella, kiu verkis kronikon-historion de «Frateco» admonis labori pli solidarece, ĉar la individuismo ne estas kons-

trua. «Klopodu por ke via Grupo estu pli komunikema kaj ekestu etoso por kunmarŝi solidarece kaj aranĝi la centjaran datrevenon de «Frateco».

La Prezidantino disdonis la Diplomojn de la ekzameno pri esperantoscio kaj legis la KONKLUDOJN de la Kongreso:

«La partoprenantoj en la 43a Hispana Kongreso de Esperanto, okazanta en Zaragoza de la 21a ĝis la 25a de Julio aprobas la jenajn KONKLUDOJN:

1-e. Profitante la partoprenon de latinamerikaj reprezentantoj en la Kongreso, oni konsentis ampleksigi kaj intensigi la kontaktojn kun tiuj Esperantaj Organizaĵoj.

2-e. Okaze de la Deklaracio de la Unuiĝintaj Nacio, pri la INTERNACIA JARO DE KOMUNIKADO, la esperantistoj konkludas, ke ne estas ebla internacia komunikado sen neŭtrala lingvo, en la deverspopolaj rilatoj.

3-e. Konsiderante la neceson, ke la ekzamenoj de Esperanto atingu la plej altan nivelon, starigi Universitatan Komisionon nomumitan tiucele por atingi tiun celon.

4-e. Intensigi la komunikadon por plibonigi la interrilatojn inter la diversaj generacioj de esperantistoj profitante la sperton de la veteranoj kaj la vigecon de la gejunuloj.

5-e. Gratuli la Universitaton de Santiago de Compostela kaj Prof. Alfonso Núñez kaj komisii la Estraron de H. E. F. por la realigo de la Internacia Preŭniversitata Kurso pri Matematiko, Kemio kaj Fiziko en Esperanto.

6-e. Plibonigi la helpon de la esperantistaro al la Organizaj Kongresaj Komitatoj por ke ili povu realigi pli fruktodonan laboron.


7-e. Starigi Jubilean Komisionon por la Centiara Datreveno de Esperanto okazonta en 1987-a, kiu inde preparu tiun eventon.

8-e. Esprimi nian dankemon al la Aragonaj Aŭtoritatoj, precipe al

la Zaragoza urbestro, Provinca Delegacio de la Ministerio pri Transporto, Turismo kaj Komunikado; Sparkaso de Zaragoza, Aragón y Rioja; Sparkaso «La Inmaculada» kaj ceteraj instancoj kaj personoj kiuj efektivigis ĉi tiun Kongreson.

La Prezidanto de la Organiza Kongresa Komitato s-ro Jaime Benito Cedo resumis la programerojn kaj agadon de la Kongreso kaj la Prezidantino de H. E. F. alvokis la reprezentanton de Sevilla por transdoni al li la flagon de la Kongreso.

Post la Kongreso kaj kvazaŭ feriofine ni ekskursis al la Parko Ordesa en la Pirinea Montaro.



Grupo da kongresanoj ĝuante la ekskurson al Parko Ordesa.

Oni devas ankaŭ menciigi ke la gejunularo aranĝis festojn kaj ludis teatraĵon kaj per sia bulteno «Senhontilo» kun la devizo «La Kontraŭkrokodila agado venis al Zaragoza», ili admonis; «Ĉu ni resignacias nur skribante konkludojn? Kion faris la diversaj hispanaj esperantaj grupoj por la paco? Ĉu vi rememoras la konkludojn de Málaga?»

Do, ke la faroj certigu la vortojn. Ĝis Sevilla!

G. MOYA

LA RAJTO JE KOMUNIKADO

(Esperantlingva resumo de la prelego de la Prezidantino de H. E. F. d-rino *María Rafaela Urueña*, okaze de la malfermo de la 43-a Hispana Esperanto-Kongreso en Zaragoza)

Karaj gesamideanoj: Denove ni estas en la komenco de nova Hispana Kongreso de Esperanto. Ĉijare la 43-a H. K. de Esperanto havas specialan signifon, ĉar ĝi havas kiel sidejon la urbon Zaragoza, kies E-Societo «Frateco» festas la 75-an datrevenon de sia fondiĝo, kaj kiu estas la nura hispana E-Societo funkcia seninterrompe dum sia vivo.

Krom tiu grava evento, la Unuiĝintaj Nacioj proklamis ankaŭ tiun-ĉi jaron «JARO DE INTERNACIA KOMUNIKADO» kaj tio por ni esperantistoj enhavas gravan signifon, ĉar ĝuste la internacia komunikado estas la ĉefa celo de niaj streboj. Pro tio, pasintjare oni decidis ke la kongrestemo estu «LA KOMUNIKADO», ĉar ĝi enkadrigas en la homaj rajtoj, kiuj malgraŭ la solenaj deklaraĵoj agnoskantaj la diversajn homajn rajtojn, ili estas malobservataj ĉiutage en multaj landoj.

Preterlasante ĉu la komunika rajto estas: civila, politika, fundamenta, socia, aŭ kultura, ĝi troviĝas en unu aŭ alia Internacia Deklaracio; vere la komunikado estas homa rajto ne realigebla individue, sed en la kadro de internacia kunlaboro kaj interrilatoj. Individue la komunika rajto estas subjektiva juro, sed kiel ĉiu homa rajto bezonas por sia efektivigo, fariĝi objektiva Juro, agnoskata en pozitivaj leĝoj. Kaj ni esperantistoj defendas tiun rajton uzante neŭtralan lingvon por ke la vera internacia komunikado, en la landoj, trans la landlimoj kaj sen lingvaj koloniismoj tiel oftaj nuntempe, **estu realajō**; kaj por ke personoj de malsamaj lingvoj povu interparoli en perfekta kaj justa lingva egaleco.

Kaj en tiu senco la hispanoj devas esti fieraj, ĉar la unua juristo defendinta la rajton je komunikado estis hispano: Francisco de Vitoria, de Salamanca, en la 16-a jarcento, li parolis al siaj disĉiploj pri la Komunikado konsiderata kiel «Natura Rajto». En tiu tempo estis kutimo en la hispanaj universitatoj ke la profesoroj klarigu lekciojn pri la gravaj temoj de la momento. Vitoria, profitante la disputon pri la leĝeco de la malkovro de Ameriko, analizis la fakton, klasifikante la opiniojn, favorajn kaj malfavorajn de tiu tempo, laŭ «Laŭleĝaj titoloj» kaj «Nelaŭleĝaj titoloj». Kaj refuntinte multajn titolojn konsideratajn laŭleĝaj en tiu momento, li konkludis ke unu el la ĉefaj laŭleĝaj titoloj por defendi la malkovron de Ameriko faritan de la hispanoj estas la latinlingve «lus communicationis» tiu rajto de komunikado bazita en la libereco de ĉiu persono translokiĝi de unu lando al alia, kaj kiun Francisco de Vitoria difinis kiel Natura Rajto. Li diris eĉ pli «Kiu intencas malobservi tiun rajton, tiu kontraŭas la bazon mem de la homaro».

Kaj tiu koncepto estis defendita dum la sekvaj jarcentoj, de la Hispana Skolo de Natura Juro, kio signifas antaŭdifini koncepton, kiu estis konata jarcentojn post, do nuntempe, per la nomo: Homaj Rajtoj.

La komunikado bezonas ilojn, kaj la lastaj jardekoj kunportis revolucion en la komunikaj sistemoj, per la teknologio, la informaj satelitoj, k.t.p.

Por bona informado, oni bezonas la teknologion, sed ne forgesante ke la bazo estas la lingvo, ĉu parola, ĉu skriba, kaj kiel prave diris s-ro Mustapha Masmoudi, en la 67-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Antverpeno: «Kial ne uzi tiujn novajn teknologiojn ankaŭ por lingva komunikado?, ĉar

ofte oni forgesas ke la sciigo de informoj pere de ĵurnaloj kaj aliaj amasrimedoj en multaj landoj, speciale en la tiel nomata «Tria Mondo» estas ebla nur per la lingvo de koloniiga lando».

Por pligrandigi la intelektan kontakton trans la propraj landlimoj, oni bezonas internacian lingvon, kaj nun en la epoko de la komunikaj satelitoj, de la gravaj teknologioj, oni forgesas ofte ke tiu lingvo jam ekzistas ekde 1887-a, kiam d-ro L. L. Zamenhof kreis Esperanton, lingvo poste agnoskita de sciencistoj kaj de internaciaj organizoj kiel UNESCO en 1954-a.

Tamen ne sufiĉas la agnosko ĝisnuna. Ni esperantistoj devas konscii pri nia propra internacia forto, speciale kiam en la nuntempo ekzistas ĝenerala forta sento pri bezono de internacia kunlaboro en la paco, en la scienco, en la komerco, k.t.p. Pli signife estas, ke post dudek jaroj, tempo inter la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj de 1948-a kaj la Deklaracio pri Homaj Rajtoj de Teherano en 1968-a, la kerno mem de la koncepto ŝanĝiĝis. Kial? Ĉar la homaj rajtoj evoluas kiel la homaro mem, kaj tiuj rajtoj jam ne estas konsiderataj nun kiel individuaj sed male kiel rajtoj enkadritaj en la internacia kunlaboro. Tamen, sen tiu internacia kunlaboro **paroli pri homaj rajtoj**, inter homoj kaj pri komunikado trans limoj de multaj mondopartoj estus ridinde.

Dum ĉi tiu Kongreso ni havos okazon pritrakti la komunikadon el diversaj anguloj dum la Seminario tiucela.

La rajto je komunikado kiel ni konsideras ĝin hodiaŭ, eniras en la deziratan Novan Internacian Ordono, ĉar por la vera interkompreniĝo de la homaro, la teknologio ne sufiĉas.

La malvolviĝo de tiu teknologio estas dezirinda, sed por ke la vera interkomunikado efektiviĝu, oni bezonas progresivan superregadon de la **HOMAJ RAJTOJ**.

Mi deziras ke ĉi tiu Kongreso estu, en tiu senco, tre fruktodona.

Notas de interés para todos los Federados

Por acuerdo tomado en la Junta General de la Federación Española de Esperanto, celebrada en el Salón de Actos de CAZAR el día 23 de julio de 1983, las cuotas para el próximo año 1984 serán las siguientes:

Miembro Individual	1.000 ptas.
Miembro Protector	2.000 ptas.
Miembro Vitalicio	20.000 ptas.
Jóvenes (menores de 26 años)	750 ptas. (1)
Mayores sin trabajo	750 ptas. (1)

(1) Para poder gozar de esta tarifa reducida es necesario el envío de documento que lo acredite debidamente.

* * *

Si no ha recibido algún número de los publicados en el presente año y se encuentra al corriente de pago de la cuota del presente año 1983, no dude en pedirlo y se lo remitiremos gustosamente.

Unu plian fojon, kiel tradicie okazas en la kadro de la Nacia Kongreso de Esperanto, mi prezentas antaŭ via konsidero la raporton pri la laboro farita ekde la lasta ĝenerala kunveno.

Pasintjare kaj en tiu ĝenerala kunveno, la Prezidantino de H. E. F. prezentis al vi, la neceson ŝanĝi la personojn kiuj regas la Federacion, klarigante la kialon por tio; sed, bedaŭrinde, ni trovis nenium kiu volus preni la torĉon de la gvidado de H. E. F. Tio por ni estis ĝojiga, unuflanke ĉar tio pruvas ke la federacianoj plene apogas la laboron de la nuna estraro, sed, aliflanke ĝi estas pensiga, ĉar oni devas konsideri ke nia estraraneca periodo finiĝos post du jaroj kaj jam nun devas esti preta alia grupo da ĝesamideanoj kiuj anstataŭos nin daŭrigante kaj plibonigante la laboron, sen interrompo kiel bedaŭrinde okazis kiam ni komencis nian estraranecan periodon.

Malgraŭ la alvoko farita pere de nia Cirkulero n^o 1, neniu, pozitive, respondis ĝin. Ni esperas ke de nun vi ĉiuj konscios pri la graveco de la problemoj kaj agos konsekvence.

Pri la okazigo en Málaga de la 42-a Hispana Esperanto-Kongreso, vi jam legis la koncernan raporton en BOLETIN, do ne estas necese ke ĉi tie ni ripetu kion vi povis legi tie. Mi diras nur ke ĝi estis unu plia kongreso en la serio de la Kongresoj de H. E. F. en kiuj oni traktis plurajn interesajn temojn tre taŭgajn por la estonteco de Esperanto en nia Lando.

Al la 67-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Antverpeno (Belgujo) ĉeestis grupeto da hispanaj samideanoj. Kiel, jam estas kutimo salutis nome de H. E. F. dum la malfermo de la Kongreso, la Prezidantino d-rino Urueña.

En la kunsidoj de la Komitato de U. E. A. kaj kiel reprezentanto de la

RAPORTO PRI LA HISPANA ESPERANTO de la periodo 1967-1968 ĝis la 30-an

Federacio aktive partoprenis la Komitatano por Hispanio, s-ro Hernández, sekretario de H. E. F.

Dum tiu Kongreso kaj inter gravuloj de la Internacia E-Movado oni eldonis ekzemplerojn de la bulteno eldonita de la E-Grupo «Frateco» de Zaragoza por informi pri diversaj aspektoj rilate la okazigon en tiu urbo de la 43-a Hispana Esperanto-Kongreso. Pro la bela aspekto de la libro ni ricevis plurajn gratulojn.

Kiel promesite en nia pasintjara raporto, siatempe ni sendis al ĉiu federaciano la Adresaron de membroj de la Federacio kune kun la Regularo de H. E. F. en la kastilia kaj en la esperanta lingvoj. Por ke la adresaro restu ĉiam aktuala, en BOLETIN, kiam ni konsideras ĝin konvena, ni aperigas la adresŝanĝojn.

Fine, post multjaraj klopodoj, ni sukcesis ke la oficiala organo de la Hispana Esperanto-Federacio, aperu laŭ regula dato, ĉar en la momento de la redaktado de ĉi-tiu Raporto estis disdonitaj la du unuaj numeroj de la nuna jaro kaj ni esperas ke la tria numero estos disdonita, antaŭ la okazigo de la Hispana E-Kongreso. Feliĉe, la nombro de membroj de la Federacio kreskis, kvankam, verdire ne tiom kiel ni dezirus por realigi efikan kaj taŭgan laboron.

Kontentiga afero estas la fakto ke pluraj novaj federacianoj kotizas de la unua momento kiel helpaj membroj, ni ege ŝatus ke ĉiu konsciu pri la neceso reguligi denove la kotizojn.

AGADO DE HIS- D) - FEDERACIO, de Julio 1982-a Junio 1983-a

Kun la celo havi regulajn kontaktojn kun la E-Grupoj aliĝintaj al la Federacio oni sendis tri cirkulerojn. Kvankam ni scias ke ĉiu atente legis lin, ni kuraĝas peti de la koncernaj respondeculoj, rektan respondon al ni.

Unu el la plej gravaj aktivaj aranĝitaj ĉijare de H. E. F. estis la turneo de la fama bulgara baritono Veselin Damjanov, realigita en la dua duono de la monato Januaro. En ĉi tiu aktivajo vige agis la Grupoj de Esperanto, kie la artisto, laŭ antaŭpreparita vojaĝplano, kantis. En ĉiu recitalo, oni trovis helpon kaj kunlaboron flanke de aliaj kulturaj instancoj, ĉu urbaj, ĉu muzikaj, kaj ni povas fiere aserti ke tiu turneo estis ege sukcesa, ne nur pro la alta kvalito de la baritono sed pro la fakto ke dank'al lia vizito oni bone diskonigis Esperanton inter la ekstera publiko.

Kiel pasintjare, denove ĉiusemajne per Radio Valladolid, kaj en la kadro de la programo «la Klubo de la Vespero», okazis programo pri Esperanto kun la partopreno de la Prezidentino kaj de la Vicprezidentino de H. E. F.

La agado en ĉiu Grupo aliĝinta al H. E. F. estis varia kaj interesa, kaj pri la plej gravaj okazintaĵoj aperis siatempe raportoj en BOLETIN.

Kontentige estas ke pluraj Grupoj, krom la jam tradiciaj, aperigas informilojn kaj bultenojn, kaj tio provas ke Esperanto vivas kaj progresas en nia lando.

La Junulara Sekcio de la Federacio daŭrigis sian viglan agadon, el kiu elstaras la sukcesa Renkontiĝo okazinta printempe en la Esperanto-Oazo de Gandía.

La Fervoja Sekcio agis kiel en pasintaj jaroj; elstaras ĝia partopreno en la I.F.E.F. kongreso okazinta en Oostende (Belgujo).

Libro-servo de H. E. F. daŭrigis sian kreskantan aktivajon, klopodante en ĉiu momento plenumi la mendojn ricevitajn.

Pro la deviga translokiĝo de la sidejo de la Esperanto-Grupo de Valladolid «Fido kaj Espero», kie ankaŭ la Federacio havas sian sidejon, estis kelkaj problemoj kiuj malebligis la normalan funkciadon de la Federacio, kvankam ni klopodis ke la plej gravaj servoj seninterrompe funkciis. Tamen, ni petas vian indulgon pro kelkaj prokrastoj kaŭzitaj.

Profitante la viziton al nia urbo de s-ano Alonso Núñez kune kun s-anoj Azorin kaj lia filo, kunsidis tri membroj de la estraro de H. E. F. por aŭskulti raporton pri scienca agado realigota en la kadro de la Universitato de Santiago de Compostela, prezentita de s-ano Alonso Núñez, kiu certe estos valora kontribuo de la hispana movado al la Centjariĝo de Esperanto.

Kun la celo pritrakti diversajn kongresaferojn kun membroj de la Organiza Komitato, vojaĝis al Zaragoza la Prezidentino kaj la Sekretario de H. E. F. la 30-an kaj 31-an de oktobro 1982-a. Alia kunveno okazis kun la nura ĉeesto de la Prezidentino en la monato februaro.

Antaŭ ni estas grava realigota laboro, kiu devas celi inde festi la Centjariĝon de Esperanto, sed por ke tiu laboro estu realigebla estas necese ke ĉiu esperantisto konsciui pri la laboro kiun li devas plenumi en la komuna tasko.

Valladolid, 30-an de junio 1983-a.

LA SEKRETARIO,
LUIS HERNANDEZ

LA ARMIGADO

En la monato februaro mi legis en ĵurnalo, ke la monda elspezo por aĉetado de armiloj estas du milionoj kaj duono da dolaroj ĉiuminute, laŭ la Instituto Internacia por la Paco de Stokholmo. Ĉu estas bezonataj aliaj statistikoj?, ĉu tiu astronomia sumo ne sufiĉas, kiel specimeno, por montri la homan stultecon?

La armiĝado, la industrio por militaj maŝinoj, estas hodiaŭ unu el la plej gravaj malsanoj, kiuj suferigas la homaron. Ĉi tiu malsano havas du aspektojn: unue el ili estas la senmezuraj elspezoj dediĉataj al ĉi tiu senprofita produktado, kio havas terurajn sekvon en la ĉiutaga vivo de la homo, kaj precipe en la vivo de la personoj malpli favorataj de la socio, pro novaj impostoj, nesufiĉa investo en la publikaj institucioj, manko de financoj por starigo de industrioj, malatento al la klerigado, konsekvence senlaboreco kaj mizero. La alia aspekto estas la psika, ĝi estas ankaŭ terura, ĉar enpenetras la homan konscion. La cerbo de la homo al kutimiĝas al la konstanta kanzono de la urĝa kaj bezonata armiĝado, kaj la homo sen principoj, ĉu sociaj aŭ politikaj, fine akceptas la armiĝadon kiel sian savon kaj tiun de la homaro. Se la investo de la mono en industrioj militaj ne kreas la fundamentojn por estonta plibonigo de la socia vivo, la psika perturbo de la homo povas detruji lian kunvivadon. La homo, kiu sentas la militon kiel rimedon por solvi la problemojn, fakte li sin jam antaŭsentas kadavro. Vole aŭ ne vole li vidas sin mortanta en milito, do viktimo de sia propra senkonscio. Neniu dubu pri tio, ke la konstanta propagando pri armiloj, kiun daŭre ni devas aŭskulti, kreas homojn robotojn, kiuj obeas demandante nemon. Mi, kiel multaj el vi, aŭdis la jenan opinion: estas bezonata milito

por solvi ĉi tiujn problemojn de nia socio. Ne povas ekzisti pli granda malfeliĉo por la homo ol la akcepto de ĉi tiu ideo ke iuj devas morti por ke la aliaj povu vivi. Tio ja devenas de la ĉiutaga informado aŭ misinformado pri la nepra bezono akiri pli kaj pli da armiloj.

Evidente, kontraŭ ĉi tiu armiĝado-koncepto leviĝas voĉoj de konsciaj homoj, kiuj apartenas al ĉiuj tavoloj de la socio kaj al ĉiuj politikaj tendencoj, Tamen, unu el la taskoj de ĉi tiuj hodiaŭaj minoritatoj estas konvinki tiujn, kiuj suferis la cerban lavadon, ke oni povas vivi sen militoj, kaj ke la armiĝado estas apokaliptika koncepto de la homo, de lia vivo kaj liaj rajtoj.

La amasiĝado de armiloj ne estas moderna invento. En epokoj, kiam la homaro konsistis aŭ vivis en triboj, kaj la laboro ne estis fundamenta rimedo por la vivo, oni jam konstruis armilojn, sendube tre rudimentajn, sed kiu estis destinataj por ataki aliajn tribojn. En la verko «La Faraono» mi legis ke miloj kaj miloj de egiptanoj estis armitaj, kiel eble plej bone por militi kontraŭ aliaj landoj, cele akiri sklavojn por la servaj taskoj kaj la konstruado de tiuj grandiozaj monumentoj pri kiuj tiom gloras la homaro. Monumentoj masonitaj kun sango kaj larmoj. La roma imperio pretigis novajn armilojn kaj militosistemojn por superregi la mondon kaj havigi al si sklavojn, kiuj amuzis la romanojn ĝis perdo de siaj vivoj. En epoko pli freŝdataj iuj landoj perfektigis la armilojn por la koloniaj militoj, kaj en nia menso estas la lasta mondmilito. Resume, la amasiĝo kaj modernigo de la armiloj, hieraŭ, hodiaŭ, kaj morgaŭ nur havas unu destinton: la militon.

Hodiaŭ la amasigo de armiloj baziĝas sur aliaj konceptoj, aŭ pro aliaj motivoj. Estas tradicia sociordo, kiu deziras daŭrigi sian vivsistemon, sed samtempe ŝprucas alia socio kun novaj ideoj kaj idealoj. Restu klare, ke ne estas mia intenco analizi, kiu pravas aŭ kiu eraras. Krome nia organo BOLETIN ne estas la adekvata informilo por tiu socia vidpunkta analizado. Sed io restas komuna al ni, ĉiuj. Kia rolo estas tiu de niaj terure mortigaj armiloj? Ĉu la amasigo de neŭtronaj, nukleaj kaj ceteraj armiloj feliĉigos la homojn. Evidente ne, ne estas alia respondo.

La nuna armiĝado ne estas komparebla al tiuj antaŭaj. Hodiaŭ oni povas detrui la homan estaĵon, la naturon, resume estingi la vivon sur la tero kaj eĉ ŝanĝi la fizikan aspekton de nia planedo. Ni ne trompiĝu, tio jam estas la vero, kaj ĉiu konscia homo devas serioze pripensi sian respondencon en ĉi tiu tasko, ĉar la paco concernas ĉiun senescepte.

Vi povas kompreni, ke ne estas mia intenco kulpigi tiun aŭ alian pro tiu amasigado de armiloj mi ankaŭ

ne deziras altrudi al neniu tiun aŭ alian opinion mian. Ĉiu restu kun siaj vidpunktoj pri tio, kiu kulpas aŭ pravas.

Mia deziro estas klarigi, ke malgraŭ persona penso aŭ kredo, oni devas konscii ke la freneza armiĝado estas malprudenta agado de la homo, kiu ŝajne celas sian propran detruon. Strange, sed tio ja estas la kompleksa teniĝo de la homa estaĵo.

Vi ĉiuj legas ĵurnalojn, kiuj prezentas la diversajn kvantojn da armiloj, kiujn posedas tiu aŭ alia lando, tiu aŭ alia bloko. Tio restu por la statistikoj. Por ni estas multe pli interesa la signigo, la kaŭzoj kaj la sekvoj de la atoma danĝero. La konduoto de la homo akiras specialan reliefon nun, kiam nia vivo dependas de butono kaj de malgrandaj grupoj de homoj havantaj en siaj manoj nian destinon, niajn vivojn kaj la estonteco de la homaro. Kontraŭ tiu armiĝado, leviĝas la homo mem, en sia lukto por la paco, sed tio ja estos la lasta parto de ĉi tiu trilogio.

Luis Serrano Pérez

REZULTO DE LA EKZAMENOJ OKAZINTAJ EN ZARAGOZA DUM LA HISPANA E-KONGRESO ELEMENTA DIPLOMO

Domingo Laconcha Abecia	Eminente kun laŭdo
María Rosario Ortega Torres	Eminente
Enrique Meseguer Aguirre	Eminente

Ĉiuj ricevis la koncernan Diplomon, en la Solena Fermo de la Kongreso.

35-a I.F.E.F. Kongreso en Ostendo

En Ostendo (Belgio), marhaveno en la Norda Maro, okazis la 35-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, de la 4-a ĝis la 10-a de junio 1983-a. Ĉeestis 435 partoprenantoj el 19 landoj. El Hispanio ĉeestis 25 gesamideanoj inter kiuj brilis grupo da tre gajaj gejunuloj Kiel en ĉiuj fervojistaj kongresoj la sukceso estis granda kaj la gekongresanoj en Ostendo pace kaj frate travivis neforgeseblajn laborajn kaj amuzajn tagojn.

Ostendo estas grandeta urbo kun 72.000 loĝantoj kaj ĝi estas rimarkinda trafiknodo pro la granda fervoja stacio kaj sia komerca, turisma kaj sporta haveno. Dank'al la klopodoj de la entuziasmaj membroj de la L. K. K. ni povis viziti la urbon sperte gvidate de gesinjoroj Dimolster.

En la novgotika ĉefpreĝejo de S-ta Petro kaj Paŭlo ĉirkaŭ 200 gekongresanoj partoprenis, dimanĉmate, ekumenan Diservon.

Post tiu ĉi emocia ceremonio oni malfermis solene la kongreson, rimarkigante ke 1983-a estas la Jaro de Internacia Komunikado kaj ke per Esperanto ni prezentas la plej humanan kaj malkaran solvon por tiu problemoj.

Dum la sestaga daŭro de la kongreso, ni havis diversajn kunsidojn, prelegojn, folklorfeston, dancojn, kariljonan koncerton kaj tri tre interesajn ekskursojn: duontagan al mezepoka Bruĝo kaj al kontenera haveno «Zeebrugge» kaj tuttagan al okcidenta Flandrio, kun vizito al la urboj «Nieuwpoort», «De Panne» (apud la franca landlimo), «Veurme», «Poperinge», «leper», kaj «Kortrijk».

La tagmanĝa loko estis en la fama parkamuzejo «Bellerwerde» apud «Zillebeke». Rememorinda ekskurso.

Tre interesa estis la prelego verkita en Esperanto de S-ro N. Vanspeybrouk: «La rolo de la fervojo en la haveno de Zeebrugge» kiu ludas altan rangon inter la grandaj nordmaraj havenoj.

La ses kongrestagoj flugis rapide kaj ni esperas la venontan kongreson kiu okazos de la 12-a ĝis la 18-a de Majo 1984-a en «Slančev Brjag» (Suna Bordo apud Nigra Maro) distrikto de «Burgas» Bulgario.

Kelkaj hispanaj gesamideanoj jam aliĝis en Ostendo al la estonta kongreso kun la deziro revidiĝi proksimjare apud la Nigra Maro okaze de la 36-a Kongreso de I.F.E.F.

Antaŭ la fino de ĉi tiu raporteto, ni devas kore danki Lucien kaj Ady de Sutter kiu baraktis, antaŭ kaj dum la ostenda kongreso, kontraŭ diversaj obstakloj. Ili zorgis ke ni ĉiutage havu malmutekoston, komunan kaj bongustan tagmanĝon, ke ni povu aĉeti specialajn Esperanto-poŝtmarkojn kaj ke ni havu libro-standon.

Feliĉe la vetero nin favoris, la hoteloj estis proksimaj al la impona kongresejo (Urba Feest-En Kultuar-paleis Bibliotheek Museum) kaj ni ĉiuj povas esti vere kontentaj: En Ostendo, dum kelkaj printempaj tagoj, floris la verdaj steloj de la paco kaj de la interkompreno de la mondpopolo. El nun varma Norda Maro, ni kumportis en niaj koroj, verajn kaj fratajn rememorojn de la libereca kaj nobleca Belgio.

H. E. F. A.



La Ĝenerala Sekretariino de U.E.A., d-rino Flora Szabo-Felső parolas dum la inaŭguro. (Foto A. Fighiera).

La plej multnombra Universala Kongreso okazis en Budapesto

Reveninte de la Universala Kongreso, restas ankoraŭ en mia memoro, kiel neforgesebla bildo, la bela Danubo kiun mi vidis el la fenestro de mia hotelo ĉiutage, kaj unu el la pontoj kiun mi devis transiri por atingi la vojon al la kongresejo: la moderna Sporthalo, facile atingebla de la centro per rapida kaj moderna Metroo.

Jam survoje, vòjaĝante ĉu per aŭtobuso, ĉu trankvile, promenante, mi vidis en la ĉefaj placoj, hungarajn kaj esperantajn flagojn kiuj atentigis la preterpasantojn pri la Universala Kongreso de Esperanto.

En la kongresejo oni komencis renkontiĝi kun konatoj kaj amikoj, kaj, kiel ĉiam konstati la grandan vicon de la plej frue ellitiĝintaj esperantistoj kiuj estis ricevantaj la kongresa dokumentaro. Ĉijare ĝi estis sufiĉe kompleta kaj alloga. Notinde estas ke ĉiuj ricevis la dokumentojn en ŝtofa sako, kiu bone taŭgis dum la kongressemajno por enmeti la diversajn aĵojn kiujn ĉiu kongresano kutime kunportas.

Jam ricevinte la dokumentojn, mi rimarkis la diversajn giĉetojn situantajn laŭlonge de la ronda konstruaĵo, kaj la bufedojn, kiuj dum

la kongrestagoj plenumis la bezonojn de la kongresanoj.

La 31-an de julio matene okazis la **Solena Inaŭguro** de la Kongreso en la Salono Zamenhof, kie apud la prezida tablo, sidis, krom la estraro de U. E. A., la Urbestro de Budapeŝto kaj aliaj aŭtoritatuloj. Elstaris S-ro Sándor Gáspár, Vicprezidanto de la Prezidio de Hungario kaj Alta Protektanto de la Kongreso, kiu en la nomo de la Prezidia Konsilio de Hungario, de la Sindikatoj kaj de la hungara popolo salutis la partoprenantojn de la 68-a Universala Kongreso. Li emfazis ke «ni konsideras la Esperanto-movadon unu el la plej noblaj kaj puraj movadoj de la lastaj jardekoj. Ĉiun honestan, bonintencan homon entuziasmigas la laboro, se li vidas ĝian rezulton. Kulturantoj de Esperanto povas vidi la rezulton de sia laboro».

Sekve prelegis S-ro Richard E. Butler, Ĝenerala Sekretario de la Internacia Telekomunika Unio, kaj ĉefkunordiganto de la Monda Komunikata Jaro, kiu prezentis la enkondukan temon de la kongreso: «Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado». Anglalingve (per tradukita teksto ĉiu kongresano povis sekvi la prelegon) li parolis pri la signifo de ĉi tiu Komunikata Jaro por la Internaciaj Organizoj, por ĉiu nacio kaj eĉ por la individuo elstaringante la rolon de la Esperantista movado rilate al la esperantigo de tekstoj pri komunikado.

Postagmeze okazis la **Malfermo de la Kongreso**, en kiu mi salutis nome de Hispanujo; la salutoj de la diverslandaj reprezentantoj fariĝis laŭ geografia ordo. Nova ideo de s-ano Mac Gill estis prezenti la diversajn landojn komencante per Hungario kaj tra la diversaj kontinentoj atingi laste Kanadon, sidejon de la venontjara U. K.

Bedaŭrinde malgraŭ la konsiloj de s-ano Mac Gill esti koncizaj en la salutvortoj, kiel ĉiam iuj reprezentantoj truzis sian parolrajton.

Kiel kutime en la Universalaj Kongresoj, ĉar tiu tago estis dimanĉo, oni aranĝis Ekumenan Diservon, ĉi-

foje en la Baziliko S-ta Stefano, bela baroka preĝejo kie, kvankam ĝi estas la plej granda de Budapeŝto, estis tute ne sufiĉa por akcepti la grandan amason da ĉeestantoj, kaj multaj el ili devis sekvi la Diservon for de la pordo. Tiel amasa estis tiu partopreno, ke la Sekretariino de U. E. A. dum la Fermo de la Kongreso rimarkigis ke la du plej multnombraj kunvenoj estis la Ekumena Diservo kaj la Kunsido de la M. E. M.

Kiel en ĉiu Universala Kongreso, la kongresanoj havis multajn eblecojn elekti inter la diversaj kunsidoj programitaj, kompreneble, mi nur povas juĝi tiujn kiujn mi ĉeestis. Mi elstarigos kelkajn kiel Landan Agadon au tiun de reprezentantoj de Landaj Asocioj kiu prezidate de d-ro Corsetti atentigis pri la realigitaj laboroj de diversaj landaj asocioj, kaj oni planis aliajn por la estonteco; la kunsidon de IKUE kaj KELI, kiun gvidis L. Kóbor, en kiu oni pritraktis speciale la venontan Ekumenan Kongreson okazonta en Hamburgo en 1984-a; la kunsidon de Monda Turismo en kiu mi prezentis al la respondeculo s-ro Grzebowski la belajn broŝurojn eldonitajn en Hispanujo okaze de la Hispana Kongreso en Zaragoza; kaj la kunveno de SEC (Scienca Esperanto-Centro), gvidatan de d-ro Otto Haszpra, en kiu mi, nome de prof. Alonso Núñez, prezentis la novaĵon pri la ĵusa akcepto fare de la Universitato de Santiago de Compostela de la plano pri la Esperanta Preŭniversitata Kurso pri Matematiko, Fiziko kaj Kemio, kaj petis la bezonatan agnoskon de la Universalaj esperantaj organizoj, ĉefe de la Scienca Eldona Centro. La propono estis vere bone akceptita kaj aplaŭdita, kaj poste mi private parolis kun d-ro Haszpra pri la temo.

Inter la **kultura programaro**, diversa kaj enhavoriĉa, mi elstarigos la Internacian Artan Vesperon, kie denove kantis la jam konata de ni hispanoj Veselin Damjanov; la Hungaran Nacian Vesperon, kiu prezentis al ni la riĉan hungaran folkloron per popolkantoj kaj popoldancoj, kaj la diversajn teatraĵojn el kiuj mi



Ĝenerala vidaĵo de la impona sportpalaco, kongresejo de la 68-a U. K. (Foto Osap).

elektis «Sen Eliro» de J. P. Sartre, bone ludita de Teatro Esperanta de Parizo (TESPA). La prezentado okazis en la moderna sed malproksima kulturcentro Pataky, kaj per ludado de kvar geaktoroj, la aŭtoro volas montri sian jam konatan penson «la infero estas la aliaj» kunmetante tri malsamajn homojn en ĉambron kaj montrante ke la nura kunesto fariĝos vera turmentado por ĉiuj.

Dum la Kongreso estis du ekspozicioj en la urbo, sed mi nur havis okazon viziti unu el ili, situanta en centra strato de Budapeŝto, en la salonoj de la Bulgara Kultura Centro, kaj kiu montris fotojn de la evoluo de la E-movado en Bulgario kaj ĉefe de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, kiun mi vidis kiam oni estis konstruanta ĝin, okaze de la Postkongreso en Smoljan en la jaro 1978-a.

Budapeŝto estas belega urbo kaj oni nepre devis viziti muzeojn, historiajn monumentojn, la Fiŝkaptistan Bastionon kaj de tie observi la unikan

vidaĵon kiun la personoj povas ĝui el tiu Fortikaĵo: la Danubon, la diversajn pontojn kaj majeste kontraŭ ĝi, la neogotikan Parlamentejon. Tiun konstruaĵon, tre belan ekstere, mi vizitis interne okaze de la akcepto farita de la Vicprezidanto de la Ministro-Prezidio al pli ol 300 reprezentantoj de la 68-a Universala Kongreso, kies salutvortoj al la ĉeestantoj estis responditaj de s-ro Maertens, Prezidanto de U. E. A. Sekvis tre abunda aperitivo kun diversaj senalkoholaj trinkaĵoj kaj kun tipaj hungaraj vinoj.

Tuttagajn kaj duontagajn ekskursojn oni proponis fari al diversaj lokoj, kvankam mi ne partoprenis en ili, ĉu pro tio ke mi jam konis Hungarion, ĉu ĉar mia aliĝo estis malfrua kaj en la momento de la kongreso restis tre malmultaj eblecoj por elekti.

Kiel jam estas kufimo, funkciis Libroservo, kie oni povis trovi tre interesajn librojn speciale tiujn eldonitajn en Hungario kaj kiuj estas

malpli facile troveblaj en la naciaj libroservoj. Vere mi ne trovis taŭga la situon de tiu Libroservo en la subtera etaĝo, iom malfacile trovebla, kaj mi opinias ke tio malebligis al multaj kongresanoj trovi la lokon, speciale kiam oni havas malmulte da libera tempo dum kongreso. Tamen oficiale oni diris ke estis je la fino bona monprofito.

Ankaŭ tre grave estis ke denove oni eldonis specialan poŝtmarkon kaj ke oficistoj estis ĉiam pretaj por stampi per spaciala stampilo, ĉifoje povante kompreni Esperanton.

La fino de la Kongreso venis kiam la kongresanoj al kutimiĝis al la kongreso kaj ĝuis la plej bonan etoson, ĉar ne vane por simpla kongresano tio estas unu el la plej altiraj allogaĵoj de Universala Kongreso.

Mi mem'renkontiĝis kun geamikoj korespondantoj de antaŭ jaroj, kaj malfacile oni trovis momenton por babilu, por komune foti, k.t.p.

Eble pro tio, mi trovis bona la ideon de hungara korespondanto kiu invitis nin vespermanĝi ĉe li iun tagon, kaj kiam ni iris, ni trovis en la salono veran internacian kunvenon. Komune babilis kaj manĝis 18 esperantistoj el ok landoj, ĉar li havis la ideon pro la manko de libera tempo kunigi ĉe si, la saman tagon, ĉiujn siajn gekorespondantojn partoprenantajn en la kongreso. Vere estis amika kaj agrabla vespero.

La **Solena Fermo**, okazis la 6-an de Aŭgusto, je la 10-a matene, kaj ĉifoje mi trovis tiun aranĝon multe pli leĝera kaj mallonga ol kutime en la lastaj kongresoj, kaj tio, laŭ mi estas konvena, ĉar ne vane multaj kongresanoj estas pretaj por baldaŭa foriro, kelkaj eĉ kun la valizoj mane.

Novaj estis la prezentado de la nova estraro de U. E. A.; plu restas kiel Prezidanto s-ro Gregoire Maertens kaj kiel ĝenerala Sekretariino d-rino Flora Szabo-Felsó. Estis elektitaj Vicprezidantoj s-roj Tonkin kaj Umeda, kaj Bárbara Despiney kiel estraranino.

Ĉar la nunjara temo estis la komunikado, la rezolucioj de la 68-a Universala Kongreso temis ĉefe pri tio, kaj speciale mi mencias la rezolucion alvokantan al ĉiu esperanto-organizaĵo doni prioritaton al la agado rilate al la Centjara Jubileo de Esperanto, kaj la unuan rezolucion pri komunikado kiu tekstas jene:

«La 68-a U. K. de Esperanto, okazinta en Budapeŝto... traktinte la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado, **konstatas** ke kvankam la komunika teknologio prezentas eblecojn solvi mondajn komunikajn problemojn kaj plialtigi la vivnivelon de parto de la homaro, ĝi riskas —se ne juste kaj demokrate uzata— pligrandigi la



Infanoj el la Kongreseto prezentiĝas.

(Foto A. Fighiera).



Nia Komitato s-ro Hernández dum komitatkunveno.

fendon inter tiuj, kiuj havas kaj tiuj kiuj ne havas la rimedojn de komunikado. Tiu risko estas aparte aktuala kiam temas pri evolulandoj rilate al industrilandoj, sed ĝi ankaŭ ekzistas interne de unuopaj landoj.

atentigas pri tio, ke la teknologia kaj lingva flankoj de komunikado ne estas disigeblaj;

rekondas al organizaĵoj interesitaj pri komunikado doni pli da atento al la lingvaj dimensioj de la internacia komunikado kaj al la rolo, kiun Esperanto —per siaj facileco kaj neŭtraleco— povus ludi en tiu kunteksto;

alvokas al organizaĵoj okupiĝantaj pri lingva edukado kaj aliaj lingvaj demandoj doni pli da konsideroj al la rezultoj de la evoluo de la komunika teknologio kaj al ties implicoj rilate la nunan lingvan ordon en la mondo cele al ĝia plijustigo kaj plidemokratigo.»

La komuna kanto de la Espero, gvidata de la internacia koruso, kiu de antaŭ kelkaj U. K. funkcias ĉiujare, estis la fina kaj kortuŝa momento de la kongreso. Jam la kongresflago estis transdonita al repre-

zentanto de la Kanada Esperanto-Asocio kaj la kongresanoj revas unu plian fojon pri venonta kongreso, pri venonta renkontiĝo en Esperantujo.

Fine, mi mencias ke la Sekretario de H. E. F. S-ro Luis Hernández ĉijare plu reprezentis nian movadon en la komitato de U. E. A., kaj ke li estis elektita kiel membro de la komisiono pri Landa Agado, kun la speciala tasko prizorgi la rilatojn kun la Latinamerikaj Esperantaj Asocioj.

Tiel, mi resumos la impresojn pri ĉi tiu kongreso, kiel vere multnombra, ĉar ne vane pli ol 5.000 kongresanoj aliĝintaj signifas la plej multnombra U. K. okazinta ĝis nun. Tamen, ofte oni ne konstatis tion, ĉar en multaj komunaj programeroj estis videbla ne tiel granda partopreno, ĉu eble ĉar estis malfacile trovi kelkajn salonojn?

Por tiuj kiuj ankoraŭ ne partoprenis en Universala Kongreso de Esperanto, estos certe tre interesa sperto, kaj bona okazo povas esti iri Vankuveron kaj ĉeesti la venontjaran Universalan Kongreson.

M. R. URUEÑA

RECENZOJ, RECENZOJ, RECENZOJ

Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas

Fernando de Diego. 12,5 x 19,5 cms. Eldonis «Heroldo de Esperanto». Aĉetebla en Libro-servo de H. E. F. Prezo: 575 p-toj.

Jen libro kiu mankis. Ĝis nun, en nia lando, kiam oni finis unu el tiuj kursoj, kiujn en nia komunumo iom eŭfemisme etikedas «unuagradaj», prezentiĝis tri eblecoj: unue, pafi sin malbenante la tagon, kiam oni decidis tiel grave perdi sian tempon; due, persiste kaj aliĝi al nova unuagrada kurso por finfine ellerni lingvon, kiun oni devus ja majstri en tri monatoj; trie, riski kaj en soleco tratabi al si vojon serĉante la fontojn de la lingvo. La unua speco de kursvizitintoj konsistigas la famajn legiojn de eternaj fuĝantoj, la dua apartenas al la Klano de la eternaj komencantoj, kar nur la tria, se malsaĝa horo ne embuskas, alvenas ĉe la flanko de Auld kaj liaj kompanoj. Nun, por hispan-lingvanoj, ekzistas feliĉa alternativo, meza vojo: le ebleco aliĝi al nova kurso por pli bonŝance ellerni la lingvon dank'al libro, kiu alportas al ni la fontojn (do, iaspeca Esperanto-krano).

En sia libro de Diego aplikas la induktan metodon (ĉi-tiu humila recenzanto lernis per tiu malnova metodo) bazante sin sur la strukturo de Esperanto, kaj tiu fakto domaĝe limigos la uzon de la lernolibro al komencantoj, ĉar kiel la aŭtoro mem rekonas: «uzantoj de tiu ĉi metodo nepre devas koni la ĝeneralajn liniojn de la hispana gramatiko» kaj ni ĉiuj bone scias, ke granda parto de la lernantoj ne posedas tiun antaŭpreparon. Tamen, mi povas aserti, laŭ propra sperto, ke post la vizitado de unuagrada kurso ĉiuj estos kapablaj pli-malpli funde eluzi la pozitivajn ecojn de la nova «gramatiko».

Mi konscias, ke multaj eblaj uzantoj de la lernolibro timas la neologismon de la aŭtoro; tial do estas necese klarigi, ke (ĉu surprize?) de Diego tenas sin en la plej striktaj limoj de la «kutima» E-o (oni tuj konstatas, ke «Plena Ilustrita Vortaro» kaj «Plena Gramatiko» estas liaj ĉefaj fontoj), kaj li nur pase klarigas kelkajn certe ne tro avangardajn formojn («re kaj re», «ricevintus»).

La lingvo uzita estas viva, verva, kaj spicita per granda kvanto de trafaj parolturnoj, ĉefe ĉerpitaj el alia nepra fonto: «Esperanta proverbaro».

Por trovi ion kritikindan, oni devas ja disfendi harojn, ekzemple: la aŭtoro tradukas la frazon «spite al la protestoj» je «a pesar de las protestas», kvankam ŝajnas pli oportuna la formo «en contra de las protestas» aŭ anstataŭigi «spite al» per «malgraŭ». Nur la aldono de longa kemia artikolo eble ricevos malaprobon, kvankam kemiistoj, kiel mi...

Nu, certe la ununura malforta parto de la libro estas la grafika prezento: etaj literoj kaj tro densa teksto, krom kelkaj, ne multaj, preseraroj («deka antaŭ la dua» 106-a paĝo) kaj dancemaj linioj ĝenetas sed... perfektuloj al altaro kaj aliaj al la faro.


Resume, do, mi senhezite rekomendas la libron al progresantoj, eternaj komencantoj kaj novaj, gramatike iom spertaj, lernantoj.

Miguel Gutiérrez Aduriz

DEZIRAS KORESPONDI

- Kun hispanoj, 20 jaraĝa floristino: Tamara Blazková.—407 82 DOLNI POUŠTEVNA 387 (Ĉeĥoslovakio).
- Komencanto 29-jaraĝa, kun gejunuloj. S-ro Laszló Köröskényi.—Hadik u. 3 NYIREGYHAZA (4400 Hungario).
- Kun hispanoj, S-ro Mirko Skoč.—P. O. Box 16 Código 1161. MAIQUETIA (Venezuela).
- 45 jaraĝa ekonomistino, handikapulino, pri manlaboroj kaj literaturo, i.a. S-ino Halina Wotiryk.—2 b Marca 27/31.—44 300 WODZISLAW (Pollando).
- 18 jaraĝa irana knabo studento pri Inĝeniertekniko kaj fervora esperantisto, kun hispanaj knabinoj: S. M. Mohammad.—Post Box 58. MACHILIPATNAM (521001) A.P. S. Hindujo.
- Kun hispanoj, S-ro. Angel Suárez Rodríguez.—Estrada Palma 103.—SANTOS SUAREZ. HABANA-5 (Cuba).
- Kun hispanaj knaboj, 18 jaraĝa blondhara flegistino. F-ino Valéria Doczi.—Rózsa Ferenz u. 71 FSZ 2. BUDAPEST (1063 Hungario).
- 16 jara hungara knabino kun gejunuloj el Hispanio, pri filmoj, muziko k.a. F-ino Eva Koczka.—Fay Andras u. 9.—JASZBERENY, 5100 (Hungario).
- Knabino 13 jaraĝa pri muziko kaj sporto F-ino Judita Szopfalvi.—Pataki Istvan u. 23.—9700 SZOMBATHELY (Hungario).
- 17 jaraĝa junulo kun knabino aŭ junuloj.—Zoltán Barta.—B.A.Z. Megye-3659 SÁTA, Kolozsvari ut 10 (Hungario).
- 32 jaraĝa edziĝinta laboristo en teksindustrio kun hispanoj. Intereso pri fotografio, filatelo kaj numismatiko. S-ro Henrick Marschner.—Kirchgasse 6. BERNSTADT (D.D.R. 8703).
- Hungara lernantino 17 jaraĝa, kun junulo. F-ino Györffy Györgyi.—Mártirok u. 85.—ZALAEGERSZEG (Hungario 8900).
- 23 jaraĝa hungara kuiristo pri diversaj temoj (Popolkantoj, kuracplantoj, k.t.p.), S-ro Kovacs Ferenc; Árpád ut. 2 2/7; 3.980 SATORALJAUJHELY (Hungario).
- Pri moderna kaj klasika muziko, filmo, turismo, futbalo 35 jaraĝa F-ino Zofia Mazurek; ul. J. Korczaka 2/15; 85.319 BYDGOSZCZ (Pollando).

Esperanto • lingvo por



universala komunikado

NOVA GLUMARKO

Oni eldonis novan glumarkon okaze de la Jaro pri Universala Komunikado kaj kiu aperis en Zaragoza koincidante kun la Kongreso.

Dukolora, oni povas aĉeti:
Plastika, por aŭtomobiloj: 60 p-toj unu.
Papera, por leteroj: 80 p-toj dek.

44-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

(Sevilla, 7-12 julio 1984-a)

LOKA KONGRESA KOMITATO

Honora Prezidanto: Moŝta s-ro Rafael Fiol Paredes
Prezidanto: s-ro Manuel Ramírez Cepeda
Vicprezidanto: s-ro Tomás Caspe Cereiĵo
Sekretario: s-ro José Pavón Arreciado
Kasisto: s-ro Juan de Dios Montoto Sarriá
Junularaj aranĝoj: s-ro Alberto Franco Ramírez
Informado: s-ro Rodrigo Vaquera Márquez
Gastigado: f-ino María Isabel Ceballos Piñero
Publikaj Rilatoj: s-ro José Abeledo González
Kulturo kaj Sporto: s-ro José Cerezo Méndez

La Provizora Programo antaŭvidas: Fakajn Kunvenojn, ekzamenojn, Seminarion pri turismo, laborkunsidon de la Hispana Jubilea Komisiono, prelegojn, omaĝon al la veteranoj de Sevilio, viziton al la Alkazaro, folkloran prezentadon artan vesperon, bankedon kaj ekskurson al Italica kaj Arcena. Ankaŭ oni antaŭvidas postkongresan ekskurson al Arcos, Jerez, k.t.p.

La temo de la Kongreso estas: «TURISMO, ĉu fenomeno de nia epoko?»

AGRABLAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVAN JARON,
deziras al vi, H. E. F.-Estraro kaj Redakcio de BOLETIN

15-an de decembro
Tago de Zamenhof
Tago de la Esperanta Libro
Mendu librojn por vi aŭ por viaj geamikoj
Libroservo de H. E. F.
Apartado 119
VALLADOLID